★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO

Unu Jaro . . . . Sm. 1.20 | Helpabono . . . . Sm. 4.—

Spesmilo (Sm.) = 100 Spadekoj (Sd.) = 2,50 frankoj = 2 silingoj = 2 markoj = 1/4 dolaro = 1 rublo = 2,40 kronoj austr = 1,80 kronoj Skand (proksimume).

Oni abonas ĉe la Administracio
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

Bulgara Eldono : N. B. Kovačef, Sofio

REKLAMO

1 paĝo	Sm. 100.—	1/4 kolono . . .	Sm. 7.—
1 kolono. . . .	» 25.—	1/8 » . . .	» 4.—
1/4 »	» 13.—	1/16 » . . .	» 2.50

25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj

Ĝeneralaj Agentoj : G. WARNIER, 46, Rue Sainte-Anne, Paris-2e
C. A. L. BROWNE, 53, Wych Street, London W. C.

KONGRESAJ IMPRESOJ

La tria kongreso finiĝis kaj la momento venis por kolekti la impresojn, kiujn ĝi al ni postelasis kaj eltiri el ĝi kelkajn konkludojn kaj spertojn. Unue, kaj pri tio ĉi sendube konsentos ĉiuj en ĝi partoprenintoj, nia tria kongreso estis vere impona nta, nedisputebla sukceso, kiu plene respondis niajn esperojn. Sukceso ĝi estis, ĉar ĝi okazis sur tiu Brita tero, kiu, laŭ profeta antaŭdiro de niaj kontraŭuloj, neniam apartenos al ni kaj sur kiu neniam nia ĵetro povos fortike etteni. Tiun profetajon plene venkis nia kongreso, kiu klare montris, ke, kiel ĉiuj aliaj nacioj, Britujo sentas egale la bezonon de helplingvo kaj iom-post-iom venas al ni, kiel jam venis la aliaj popoloj, pri kiuj oni diris similajn argumentojn. Malgraŭ tiuj altsonantaj prediktoj, jen aligis al ni la Britoj kaj kun sia praktika prudento plej bone organizis tiun kongreson. Sukceso ĝi estis rilate al la nombro de la partoprenintoj ; 1500 personoj (anstataŭ 1000 en Genevo) alveturis Kembriĝon el ĉiuj landoj kaj dum unu semajno vivadis, kvazaŭ ili estus regnanoj de sama lando kaj neniam ekzistus inter ili la lingvaj bariloj. Tio estas la blindiga fakto, kiu en Kembriĝo kiel en Genevo kaj Bulonjo pli efikis ol miloj da vortoj, la fakto, kiu konvinkis kaj konvinkos tiujn personojn, kies kredon ne faras tia aŭ alia moda kritikisto, sed la senpartia vido de la realajo. Sukceso ĝi estis, ĉar oni en ĝi faris utilan laboron. La decidoj de la kongreso pri tutmonda festo kaj ĉefe pri la helpa mono estas plej gravaj kaj havos plej bonan rezultaton. En Kembriĝo, same kiel en Genevo, oni laboris precipe en la specialistaj kunvenoj. En la kunveno de la konsulo kaj Esperanto-Oficoj, oni sukcesis interkonsenti pri certaj punktoj kaj oni de nun povos serioze laboradi por la efektivigo kaj vastigo de tiu utilega organismo. Aliaj multenombraj societoj fondiĝis kaj preparis prudentan planon de agado. Fine, nova organo, ĥiu laŭ nia opinio, estas tuno el la plej gravaj fortikajoj de l'Esperantismo, definitive fondiĝis : mi aludas pri la Scienca Asocio, kiu en sia estraro kalkulas konatajn sciencistojn, kiuj per sia aktiva partopreno en nia movado, montras ĝian seriozecon kaj atendiecon. Pli kaj pli, dum la kongresoj montras, ke la estonteco de nia afero dependas de la specialistaj societoj, kinj *uzos* Esperanton por sia propra utilo ; jupli multĝados tiaj societoj, ju pli ili farigos vivantaj kaj agemaj, despli la venko de Esperanto estas proksima, ĉar tiam nia lingvo fariĝos vera bezono de siaj uzantoj kaj estos jam enradikigita en la kutimo. Tion ĉi oni neniam tro multe ripetos, ĉar tro multaj estas ankoraŭ eksskluzive priokupitaj de la predikema propagando, kaj ne atentas pri la nova periodo, kiun komencis nia movado.

***

Post tiu plezura konstato de la granda sukceso ricevita de nia kongreso, ĉu oni permesos al mi fari kelkajn rimarkojn, pri kiuj same opiniis multaj personoj kaj kiuj eble povus utili al la organizontoj de la proksima kongreso.

Niaj kongresoj, oni scias, havas nenian leĝodonan povon : ĉar ili reprezentas ne la Esperantistaron, sed simple la personojn, kinj povas veturi al la kongreso, ili povas esprimi nur dezirojn ; sekve ilia kampo de agado estas tre malvasta kaj la temoj, kiujn ili povas diskuti, ne multenombraj. Eble, iam venos la tempo, kiam oni sentos la bezonon laburi, kaj tiam la organizajoj mem elektos delegitojn kun difinita misio, kiel en la kongresoj kiuj voĉdonas decidojn kaj ne nur elmetas dezirojn. Al tiu ĝi sistemo, oni povas kontraŭdiri, ke Esperantismo per si mem ne estas organizita kaj ĝi fariĝos pli kaj pli tro elasta, tro vasta por ke oni povu apliki al ĝi leĝojn, tiom pli ke por la specialaj demandoj ekzistas jam rajtigitaj aŭtoritatoj (kongresaj komitatoj, Lingva Komitato, k. a.). Kio ajn estas, kaj ne perdiĝante en senfinaj teoriaj diskutoj, ŝajnas ke, ĉar nia kongreso konsideritla kiel tuto ne havas leĝodonan povon kaj la temoj en ĝi prezentataj estas ne multaj, estas tute ne necese organizi tro multe da ĝeneralaj kunvenoj ; mi komprenehle ne aludas la solenajn kunvenojn, kiuj devas ekzisti, sed nur la « laborajn » kunvenojn. La ekzemplo de la Kembriĝa kongreso estas karakteriza : ĉiumatene, la kongresanoj kunvenis kaj, ĉar plej ofte ne ekzistis difinita tagordo, la diskutado disvagadis pri ĉiaj temoj kaj rezultis en sencela babilado, iafoje amuza, sed per si mem neutila. Dume, la specialaj kunvenoj, kiuj havas multe da laboro, devis sin kontentigi per unuhora kunsido, tiom pli ke ekskursoj estis organizitaj en la sama tempo. Oni ne kredu, ke la ĝeneralaj kunvenoj havas speciale grandan efikon propagandan ; pro la fakto, ke la diskutado estas tre ĝenerala kaj konsistas ĉefe el ripetitajoj, kiuj rezultas en nenio, ili por la pensema publiko prezentas certe malpli atentindan valoron ol la specialfakaj kunvenoj, en kiuj oni diskutas pri precizaj punktoj kaj vere laboras. Por konkludi, ŝajnas al mi bone, se en la venontaj kongresoj oni organizos, flanke de la solenaj maiferma kaj ferma kunvenoj, nur unu aŭ maksimume du « agadajn » kunvenojn, en kiuj certe povos esti solvataj ĉiuj demandoj, se oni havas iom da metodo, kaj la restantan tempon oni la su por la specialistaj kunvenoj, kiuj formas tiom da interesaj kongreseroj kaj aliparte devas laŭeble ne koincidi unuj kun la aliaj. Fine, lasta deziro : oni ne organizu ekskursojn dum la kunvenoj, sed pli bone oni, se eble, alternigu unu tagon de ekskursoo, ĉe kiu ĉiuj ekkonas sin reciproke kaj unu plenan labortagon (kiel en Geneva kongreso). Tiujn rimarkojn mi aŭdis de diversaj flankoj, kaj, ĉar iafoje la kritiko pli utilas ol senlima laŭdo, mi uzas la okazon por ilin fari. La tria kongreso estas paŝo al io pli bona kaj pli fruktoporta.

***

Fakte la Kembriĝa kongreso estas grava kuraĝigo por la estonteco ; ĝi elmontris la kreskantan vivon de nia movado, ĝi ree pruvis, ke ni batalas por io fortika kaj vivokapabla ; ĝi donis al ni ĉiuj novajn fortojn kaj novan ĝojon por efektivigi la taskon ĉiutagan, sur kiu ĉiu Esperantisto devas siaflanke labori — ĝis ni transsaltos la lastajn barojn kaj niaj kongresoj disdividiĝos en centojn da internaciaj specialaj kongresoj kaj festoj... per Esperanto.

H. HODLER.

TRA LA MONDO

Francujo.

Parizo, Septembro 1907.

Kiam en Francujo la interna politiko silentas — tio ne daŭras longe — la ekstera politiko okupas la tutan atenton, tiom pli ke nuntempe la demando ne estas pure diplomatia, sed ankaŭ milita. Nia lando estas nun vole-nevole alligita kun Markujo kaj ĝi certe nur komencas la sinsekvon de la prizorgoj kaj malagrablajoj, kiujn al ĝi rezervas tiu klasika tero de l'malkonsento. La fakto, kiuj necesigis militan agadon en parto de Markujo, estas tro konataj de ĉiu por ke mi bezonu tiun resumi. Ne diskutante pri la necesece de kolonia politiko, sed konsiderante nur tiun fakton, ke kolonia politiko ekzistas, oni devas konfesi, ke Francujo en tiaj circonstancoj ne povis agi aliamaniere, kaj pri tio ĉi tiel bone devas konsenti ĉiuj aliaj regnoj, ke ili neniel kontraŭstaris al la okupo de Casablanca. Kelkaj rapidigemuloj dezirus, ke Francujo tuj komencu la plenan amiliiton de Marokujo, sed ili estas nur tre malgranda malplimulto. En sia plej granda parto, la Franca popolo tre bone komprenas, ke ĉia provo de almilito de Marokujo kostus centoble pli ol ĝi liverus kaj krom tio kaŭzus gravajn komplikajojn en niaj rilatoj eksteraj. Nur la fakto, ke Francujo pretendas agi respektante la traktaton de Algesiras efikigis tiun bonvolan neŭtralecon, kiun montras la aliaj landoj. Cetere, la lastaj renkontiĝoj de reĝo Edvardo kun S-ro Clemenceau kaj aliparte la lasta intervidiĝo de Norderney inter princo von Bülow kaj S-ro Cambon multe klarigis la situacion. La rilatoj kun Germanujo — laŭ la diro de la plej multaj gazetoj de ambaŭ landoj — estas nun tute bonaj kaj Francujo povos libere daŭrigi sian agadon en Marokujo. Sed tiu lando ĉiutage rezervas novajn surprizojn : jen, surtronigas nova mistera sultano, pri kies intencoj neniu precize aŭ eĉ proksimume scias. En tia implikaĵo, kia estas Marokujo, la tasko de la Franca regnestraro certe ne estas facila. Oni nur esperu, ke oni ne oferos tro multe da sango kaj vivoj por tero, kiu iam, malgraŭ ĉiuj naj penoj, sin liberigos de ĉia Eŭropa influo.

La lastaj balotoj de parto de la Departementaj konsilantaroj estis sukceso por la nuna regnestraro. La plej multaj elektitoj estas radikaloj, sed tiu ĉi vorto ne havas tute la saman signifon kiel antaŭe. De la tempo, kiam la radikaloj apartigis de la socialistoj, ili fariĝis partio esence regnestrema, sekve konservativa, firme aligita al la nuna institucioj de Francujo, sed batalanta kontraŭ revolucieme kaj socialismo. La diritaj Departementaj konsilantaroj esprimis dezirojn pri generala politiko ; la plej multaj gratulis la militistaron pro batalado en Marokujo, kelkaj protestis kontraŭ antimilitarismo kaj antipatriotismo.

Pli ol Marokujo, antimilitarismo estas ofta temo de diskutoj. Okazas ĉiutage en la armeo iaj faktoj, kiuj montras ke la ideoj antimilitarismaj atakas la soldatojn, ĉefe la rezervajn soldatojn. En la lasta Franca socialista kongresa, la ideoj de Hervé, la franca protagonisto de l'batalo kontraŭ armeo, estis akceptitaj en formo iom pli modera ; la rezolucio akceptita de tiu kongreso cetere ne estis akceptita de la internacia socialista kongreso, kaj tio elvokis akre mokajn komentariojn en la Franca nesocialista gazetaro. Fakte, de la disvastigo de la antimilitarismo en gia malmoderna formo, la stato politika de Francujo ricevis notindan ŝangon : la socialistoj, kiuj iam estis la plej firmaj subtenantoj de la radikalemaj regnestraroj, estas nun la plej firmaj malamikoj de la radikalismo kaj estas trafitaj de la atako de ĉiuj partioj, sed oni ne povas diri, ke la socialismo perdis ion en tio, ĉar ĝi fariĝis timinda forto de opozicio multe pli danĝera ol antaŭe pro sia forteno de ĉia kompromiso kun aliaj partioj.

B. T.

Germanujo.

Berlino, Aŭgusto 1907.

La politiko estas nun tre trankvila, ĉu pro tio, ke la Reĥstago estas for, ĉu ĉar pri Markujo, la sola temo nuntempa, la gazetaro konsentas, ke Germanujo devas konservi neŭtralecon kaj lasi al Francujo liberecon por agadi. La renkontiĝoj de la Imperiestro, unue kun la Caro, due kun la Reĝo de Anglujo, la alia renkontiĝo de la kanceliero kun S-ro Cambon estis konsideritaj kiel ĝojigaj pacosignoj. La Imperiestro mem en lianovro laŭte esprimis la deziron, ke daŭros la paco « sen kiu la plej persista laborego de la urbanoj kaj kamparanoj estas vana ».

En urbo Stuttgart, kunvenis la internacia socialista kongreso, kie oni varme dispu tis pri la agado kontraŭ la armeoj. La diskuto montris, ke la Germanaj socialdemokratoj, estritaj de Bebel, Stockmar, Singer, ne konsentas kun la Francaj socialistoj pri la rekta agado en okazo de milito, ĉar tia agado estus en Germanujo io mortiga por la socialdemokratio. Pri tiu ĉi temo, ia interkonsentita decido estis voĉdonita. Oni ankaŭ disputis pri la rilatoj inter socialismo kaj koloniigado, kaj ĉefe inter socialismo kaj sindikatismo. En tiuj kongresoj, oni jam rimarkis, ke la Germanoj havas apartajn ideojn, kiujn oftе ne komprenas la alilandanoj. La movado socialdemokratia estas efektive en Germanujo ia jam potenca jam organizita forto, kiu havas agadon praktikan kaj oportunistan. Flanke de la socialdemokratoj, ekzistas la sindikatismo, kiu estas pli fortike organizita ol en la aliaj landoj. Jen estas kelkaj ciferoj, kiuj pruvas, ke la organizigemo estas karakteriza eco de la Germana laboristaro, eĉ ne apartenanta al la socialdemokratio. La sindikatoj socialistaj kalkulis en la fino de 1906, 1.799.293 anojn (369.000 pli ol en 1905) ; la sindikatoj Hirsch-Duncker kalkulas 118.000 kaj la sindikatoj Kristanaj 320.247 anojn (55.216 pli ol en 1905) ; flanke de ili, ekzistas memstaraj sindikatoj diversspecaj kun proksimume 150.000 amoj ; tiuj ciferoj reprezentas sumon da 2.400.000 sindikatanoj tre regule organizitaj. La socialdemokratiaj sindikatoj havas tendencojn praktikajn kaj reformistajn (la malo de Francujo) dum la politika partio estas pli absoluta kaj revolucia, sed inter la sindikataro kaj la partio nun ekzistas interkonsento kaj relativa samopinieco. Oni erarus, se oni kredus, ke tiuj du milionoj da organizitaj laboristoj aligis al la socialdemokratio kaj al ĝia idealo. Kontraŭe, la « Kristanaj sindikatoj » kaj kelkaj aliaj rekonas ke la « fundamento de la nuna socio politika kaj ekonomia estas necesa » kaj celas « laŭeblan pliboniĝadon de la ekonomia kaj socia stato de la laboristaro ». Eĉ en la socialdemokrataj sindikatoj, la elementoj estas tre diversaj, ofte konservativaj kaj tio kaŭzas, ke en la kongresoj la Germanaj socialistoj restas malpli antaŭenigemaj ol la aliaj ; ankaŭ la nuna organizacio de l'Imperio vole-nevole influas sur ilin. En Stuttgart, la demando pri la uzo de lingvo internacia en la socialistaj kongresoj estis metita sur la tagordon laŭ propono de la Franca delegitaro, sed la kongreso rapidege, sendiskute, prokrastis la ekzamenon de la demando, kiel « frumatura ». Kelkaj estroj de la dirita kongreso eĉ konsideris ĝin kiel ridindajon ne indan de la atento de l'kongreso kredeble ĉar ili ne konis eĉ supraje la demandon. Dum « internacistoj » tiel sage antaŭvidis la estontecon kaj interdispudtis por starigi teorian formulon, 1500 Esperantistoj kunvenis en Cambridge... kaj interfratiĝadis sen bezono de ia ajn formulo.

F. S.

Unuigitaj Ŝtatoj

Seattle, Aŭgusto 1907.

Jus finiĝis en Boise, Idaho, la plej grava leĝa batalado kiu okazis en Ameriko dum multaj jaroj, se ne en la tuta historio de la lando. William D. Haywood, sekreta-

rion-kasiston de la Okcidenta Federacio de Minlaboristoj, oni kulpigis antaŭ preskaŭ du jaroj pri la mortigo de eksgubernestro Steunenberg, de Idaho, kvankam li ne estis en tiu ŝtato kiam okazis la afero. La batalado varbis la plej eminentajn advokatojn en la lando ĉe ambaŭ flankoj, daŭris ses semajnojn kaj rezultis en la senkulpigo de la arestito. La laboraj klasoj en Ameriko konsideras tiun ĉi kiel grandan venkon kaj en preskaŭ ĉiu urbo en la lando oni festas ĝojege. Jam en multaj socialistaj jurnaloj kaj paroladoj Sinjoro Haywood nomiĝas kiel kandidato de la partio socialista por prezidanto en la venonta elekto de 1908. Pro la ekstrema graveco de la afero kaj la kaŭzoj kondukantaj al la aresto de S-ro Haywood kaj du aliaj estroj de la federacio, Moyer kaj Pettibone, kulpigitaj kun Haywood kiel helpintoj pri la nomita mortigo, kredeble iom da historio estos interesa legaĵo al la fremdaj Esperantistaj. Ni devas komenci antaŭ kelkaj jaroj kaj rakonti kiel fondiĝis granda societo aŭ unuiĝo inter la laboristoj en la minoj kaj minajreduktejoj en Colorado-ŝtato. Jam de longe la minposedantoj en Colorado, Montana, Idaho, Utah kaj aliaj ŝtatoj unuiĝis por pli bone batali kontraŭ siaj dungatoj, kaj tiel sukcesis ke kiam fondiĝis la O. F. de M., la laboristoj jam povis apenaŭ vivadi per la salajroj ricevitaj. La Asocio de l'Minaj Posedantoj estas unu el la branĉoj de la Citizens Alliance, (Interligo de Landanoj), grandega asocio enhavanta la plimulton el la kapitalistoj, komercistoj, bankieroj, k. t. p., en Usono, kaj fondita sole por ĉiam kaj ĉie batali kontraŭ la metiaj unuiĝoj, celante subpremi la laboristojn de tiu ĉi... libera lando ĝis efektiva sklaveco. Oni scias kiel en Ameriko la kapitalista klaso estas ĉiopova. Kompreneble ekzistas superstiĉo ke « la popolo regas », sed efektive tia havas la saman influon pri la politikaj aferoj kiel pri la movado de la tajdoj. Troviĝas du grandaj partioj, la « Republican » kaj « Democratic », kiuj dividas inter si la oficojn, naciajn, ŝtatajn kaj urbajn. Al la kapitalistoj ne gravas, eĉ iomete, ĉu elektiĝas kanditatoj el la Republican aŭ Democratic vicoj ; ĉar tiaj kontrolas ambaŭ partiojn — pro la fakto ke nur per la mono ricevita de la kapitalistoj la nomitaj partioj povas funkcii — estas kompare facile kontroli la kongreson, la oficistaron, la juĝistaron, same kiel oni kontrolas la tutajn komercajn kaj industriajn aferojn de la lando. Aliparte la jurnaloj, universitatoj, eklezio kaj la sciigaj rimedoj ankaŭ estas sub la kontrolo de la kapitalistoj. En Usono socialistaj ideoj ankoraŭ ne enpenetris la dikajn kapojn de la laboraj klasoj ; la socialistaj jurnaloj estas malmultaj, malfortaj. La kapitalismo tuj rekonis en la Okcidenta Federacio de Minlaboristoj tre danĝeran malamikon, ĉar la federacio ne nur anoncis intencon gajni al si ĉiajn eblaĵojn dum la daŭrado de la nuna sistemo, sed malkaŝe, maltime laboris por la partio socialista, al kiu la plimulto el la membroj aliĝas. La ĉefoficejo de la O. F. de M. troviĝas en Denver, Colorado, en kiu ŝtato estas multaj or-, karb-kaj arĝentaj minoj, kie laboras multaj miloj da dungatoj. Baldaŭ okazis grandaj strikoj por gajni pli altajn salajrojn, pli bonajn kondiĉojn, monpagon anstataŭ komercaĵoj el la magazenoj de la minposedantoj, k. t. p. Dum kelkaj jaroj la O. F. de M. sukcesis plibonigi la kondiĉojn de sia anaro. Fine, laŭ ilia kredo, « la pacienco ĉesis esti virto », kaj oni preparis ekstermi la asocion de la laboristoj. Kiam okazis alia striko en Cripple Creek kaj Telluride, oni anoncis ke de tiam neniu el la O. F. de M. povos gajni laboron en Colorado, alvokis al la guberniestro de la ŝtato por militistoj, kaj komencis veran militon kontraŭ la O. F. de M., ĝiaj estroj kaj simpatiuloj. En diversaj distriktoj oni starigis militan leĝon, laŭ proklamo de la guberniestro, kvankam vere ne ekzistis ia leĝrompaĵo de la strikantoj. La militistoj kaptis multajn el la O. F. de M., ilin ĵetis en malliberejojn, nomatajn « bullpens » aŭ forpelis ilin el la ŝtato vagonare. Sed, sub la saĝa estreco de S-roj Haywood kaj Moyer, la anaro de ilia societo faris neniajn malbonaĵojn, ne kontraŭstaris kontraŭ la militistoj, sed pace akceptis la nehumanajn agadojn de siaj persekutantoj dum la tuta tempo. Mi ne povas rakonti kiajn kruelaĵojn oni suferis per la manoj de la M. P. A. kaj iliaj leŭtenantoj, la guberniestro, juĝistaro, militistoj, kaj distriktaj oficistoj. Ambaŭ Moyer kaj Haywood sin trovis dum kelkaj monatoj en malliberejo, kaj oni facile sciiĝas ke pro tiaj persekutadoj la O. F. de M., almenaŭ en Colorado, ekvekiĝis. Fine, la minposedantoj sukcesis forpeli ĉiujn anojn de tiu unuiĝo kaj trovis sufiĉajn aliajn dungatojn por siaj minoj. Aferoj en Colorado iom kvietiĝis, oni permesis liberecon al la persekutitoj kaj la M. P. A. restadis mastro pri la situacio. Sed ne kredu ke la O. F. de M. mortiĝis. Tute ne ; ĉiam kaj ĉie en la minregionoj laboris agentoj, malkaŝe aŭ sekrete, laŭ circonstancoj, kaj ĉiam kreskadis la unuiĝo. En aliaj ŝtatoj oni gajnis multajn pliboniĝojn por siaj anoj, kaj evidentiĝis al M. P. A. ke aliaj rimedoj estis necesaj por efektive sufoki la malamikon. Baldaŭ okazis en Boise, Idaho, kruela mortigo. Eksguberniestro Frank Steunenberg, de tiu ŝtato, enirante sian kamĉompeton vespere, surpaŝis sur maŝino, kiu, eksplodante, tiel kruele vundis la viron ke li vivis nur kelkajn minutojn. Tuj la grandaj jurnaloj bruadis, dirante, ke tio certe estis ago de la O. F. de M., kaj post kelkaj tagoj oni arestis suspektulon nomatan Harry Orchard, kiu, dum kelke da tempo, troviĝis en Boise, senokupe. Kelkajn jarojn antaŭ sia mortigo, Steunenberg ludis gravan rolon en striko ĉe distrikto konata kiel la « Cœur d'Alenes ». Tie okazis similaj persekutadoj kiel poste en Colorado, sed ne tiel gravaj. Steunenberg mem estis membro de la M. P. A., kaj tiu asocio sin interesis pri la afero, dungigante la malgoran « Pinkerton'an Detektivan Asocion » kiel helpanto pri la mortigo. Oni diris ke Orchard konfesis ke li agis kiel agento de la O. F. de M. kaj unu nokton en Denver, Colorado, oni arestis la tri estrojn de tiu asocio, S-roj Moyer, Haywood kaj Pettibone, ilin rapide envagonigis kaj tuj forportis la virojn el la ŝtato ĝis Boise, Idaho. En Colorado kaj ĉiuj aliaj ŝtatoj amerikaj la leĝo diras ke nur se homo estas efektive en ia ŝtato kiam okazis krimo, sed poste forkuras li povas esti arestita kaj venigate al la loko de la krimo. Al la demando farita al la guberniestro de Colorado de la guberniestro de Idaho tiu ĉi juris ke la tri sinjoroj estis efektive en Boise kiam Steunenberg mortiĝis, kvankam ĉiu bone scias ke ĉiuj sin trovis en Denver — pli ol 800 mejlojn malproksime

Oni arestis tiujn sinjorojn, malpermesis al ili sciigi la familiojn, komuniki kun advokatoj aŭ sinhelpi iamaniere. Post la alveno en Boise la trio ĵetiĝis en malliberejon kaj tie ili restadis dum jaro kaj duono, kvankam la O. F. de M. alvokis al la plej alta juĝistaro en la lando, en Washington. Apenaŭ necesas diri ke tiuj procedoj estas kontraŭ la konstiticio de la nacio kaj ĉiuj ŝtatoj. Sed, kvankam la tuta kapitalista klaso, per jurnaloj kaj paroladoj, tuj kondamnis la tri estrojn, la efikoj en la laboraj klasoj estas rimarkindaj. En centoj da urboj okazis grandaj kunvenoj, paroladoj, procesioj, multege da Haywood'a entuziasmo, k. t. p. Granda sumo da mono kolektiĝis, eminentaj advokatoj dungiĝis, kaj oni penis ĉiarimede, sciigi la amasojn pri la konduto de la registraro. Eĉ la prezidanto de Usono, la multe laŭdata Theodore Roosevelt, nomis la arestitojn « undesirable citizens », (nedezirindaj landanoj kontraŭ ĉia inda tradicio de sia granda ofico kaj kiam ekzistis absolute nenia evidento ke la diritaj sinjoroj estas kulpaj. La socialistaj jurnaloj, aparte la « Appeal to Reason », senĉese bruadis, montris la malkulpecon de la tri estroj kaj maltime kulpigis la minposedantojn de la mortigo, per Orchard, ne nur de la mortigo de Steunenberg sed ankaŭ multaj aliaj krimoj, aparte la detruigo de la staciodomo en Independence, Colo., kie dekdu laboristoj mortiĝis. Fine okazis la granda leĝa batalado en Boise. Pli ol mil homojn oni venigis antaŭ la juĝistoj kaj advokatoj, antaŭ ol la necesaj dekdu akceptiĝis kiel juĝantaro. Tio estis ĉar dum multaj monatoj ĉiuj jurnaloj en Idaho sisteme mensogis pri la afero. Tamen dekdu troviĝis kiuj juris ke ili ne antaŭjuĝis la sinjorojn kaj komenciĝis la afero. La precipa kaj preskaŭ la sola atestanto kontraŭ Haywood, estis Orchard, kiu juris ke li mortigis ne nur Steunenberg sed multaj aliaj en diversaj ŝtatoj — ĉiuj laŭ ordonoj de S-ro Haywod. Orchard konfesis la mortigon de pli ol tri dek viroj, multe da steloj kaj diversaj aliaj krimoj. Laŭ S-ro. Orchard li estas la plej malbona krimulo en la mondo, sed bedaŭrinde neniu kredas — speciale kiam multaj atestantoj konstatis ke li estis aliloke kiam okazis multaj el la nomitaj krimoj. Orchard diras ke li nun estas kristano, tre pentas siajn krimojn kaj pretiĝas suferi ĉian juĝon pro siaj krimoj. Tamen, malgraŭ la fortaj penoj de la M. P. A., la registraro de du ŝtatoj, la antaŭjuĝo de la juĝantaro, la Pinkerton'oj kaj la juĝisto mem, la kulpigito, post la fino de unu el la plej rimarkindaj paroladoj iam aŭditaj, farita de S-ro. Clarence Darrow, ĉefadvokato por Haywood, oni juĝis Sinjoro Haywood « ne kulpa ». Tuj tiu ĉi liberiĝis, ankaŭ S-ro Moyer, kiun la ŝtato nun malesperas kondamni, kvankam Pettibone ankoraŭ restadis post bariloj.

Multaj en nia lando kredas ke tiu ĉi afero multe efikos unuigi la laborajn klasojn en Ameriko kaj montros al ili la necesecon agi kune sur la politika kampo, kion, ĝis nun, ili neniam ellernis. Se tio okazos, la socialista partio kaptos multe pli da balotoj ol iafoje antaŭe, aparte se ili nomos S-ron Haywood kiel prezidantan kandidaton.

Charles E. RANDALL.

Tutmonda Kroniko

15 Aŭgusto, Berlino. — Mortas la fama violonisto Jozefo Joachim.

Parizo. — Alveturas la reĝo de Siamo.

16, Fez (Marokujo). — Mulai-Afid estas proklamita sultano de Marokujo.

18, Stuttgart. Inaŭguracio de la internacia socialista kongreso.

19, Casablanca. — Atako de la Marokoj kontraŭ la urbo ; 300 mortintoj.

20, Hinujo. — Eksplodo en la minejo Fang-Tsé ; 110 mortintoj.

Antverpeno. — Komencas la striko de la laboristoj de la dokoj.

21, Marienbad. — S-ro Clemenceau vizitas reĝon Edvardo VII^a^.

Lisabono. — Bombo mortigas 2 personojn. Oni malkovras komploton kontraŭ la reĝo kaj la ĉefministro.

22-23, Semmering (Aŭstrujo). — Renkonto de la ministroj Aerenthal kaj Tittoni.

22, Bordeaux. — La Hispanaj gereĝoj vizitas la marekspozicion.

Lyon. — Mortas pastro Planque, estro de la Afrikaj misioj.

24, Montegallo (Italujo). — Mortas kardinalo Taliani, eksambasadoro en Vieno.

25, Ischl. — La ministroj Aehrenthal kaj Tittoni estas ricevataj de la imperiestro de Aŭstrujo.

Würzburg. — Kongreso de la Germanaj katolikoj.

Bordeaux. — Fervoja ektuŝego apud Coutras ; 11 mortintoj.

26, Parizo. — Alveturas la reĝo de Grekujo.

Bergama. — Lombarda kongreso por la sankta muziko.

Sabrante (U. S. A.). — Eksplodo de dinamito detruas vilaĝon.

Ollen (Italujo). — Inaŭguracio de scienca instituto (Alpa Universitato) je alteco da 3000 m.

Japanujo. — Terura brulado detruas parton de urbo Hakodate ; malgajno da 30 milionoj da Sm.

Peterburgo. — Oni inside mortigas K-lon Ivanoff.

28, Londono. — Fermo de la Parlamento.

Pana (Hungarujo). — Konflikto inter la soldatoj kaj la Rumenaj kamparanoj ; 3 mortintoj, 24 vunditoj.

29, Québec (Kanado). — Falado de ponto sur rivero S-ta Lorenco ; 85 mortintoj ; malgajno da 8 milionoj da Sm.

30, Borgomanero (Italujo). — Elfalado de la Sanktejo de Boca ; malgajno da 80 mil. Sm.

Karintio (Aŭstrujo). — Akcidento de manovro ; 3 soldatoj mortas.

31, Peterburgo. — Oni subskribas la interkonsenton Angla-Rusan.

A. TELLINI.

ESPERANTO PRAKTIKA

Akcia Societo Esperanto

1^a^ Fonda kunveno. En la jaro 1907^a^, la 13an de Aŭgusto, je la 4^a^ horo, en urbo Kembriĝo (Botanikejo), Sinjoroj akciuloj de la societo nomata *Anonima Akcia Societo Esperanto* kun kapitalo da 7000 frankoj (2800 spesmiloj), kies sidejo estas en Genevo, 8, rue Bovy-Lysberg kunvenis por la unua laŭleĝa fonda kunveno. Estas verkita tabelo de la ĉeestantoj. S-ro R. de Saussure, kiel provizora prezidanto malfermas la kunvenon. S-ro Mesny estas sekretario. La prezidanto, konstatinte, ke la laŭleĝa nombro de la akciuloj ĉeestantaj kaj reprezentataj estas atingita, deklaras, ke la kunveno estas laŭleĝe formita.

La ĝisnuna direktoro de *Esperanto*, nome S-ro H. Hodler legas poste la raporton pri la ĝenerala stato de la entrepreno, kiun li fordonas al la societo kaj aparte pri la financa stato de la jurnalo. Tiu raporto estas konsultebla de S-roj akciuloj. S-ro Hodler poste legas la proponitan regularon de la Societo ; diversaj proponoj estas farataj kaj akceptataj de la ĉeestantaro. La definitiva akcepto de la regularo kaj la elekto de la komitato estas prokrastitaj ĝis venonta kunveno.

2^a^ Fonda kunveno. La dua fonda kunveno okazis la 17an de Aŭgusto, je 12a horo, en urbo Kembriĝo (juĝejo). Estas verkita tabelo de la ĉeestantoj. S-ro Bousquet estas elektata prezidanto de la kunveno. La prezidanto, konstatinte ke la laŭleĝa nombro de la akciuloj estas atingita, deklaras ke la kunveno estas laŭleĝe formita.

La protokolo de la 1a kunveno kaj la regularo de la Societo estas unuvoĉe akceptitaj. La Administra Komitato estas poste balotita ; estas elektataj jenaj anoj : S-roj de Saussure, Genevo ; Th. Rousseau, Bourg ; R. Mesny, Granville ; C. Küchler, Frankfurt ; N. Evstifeijeff, Rusujo. La komitato povos se bezone elekti novajn anojn. S-ro Hodler estas direktoro por periodo da tri jaroj.

Post tiuj formoj, la Anonima Akcia Societo Esperanto estas eldirata de nun laŭlege formita.

La Prezidintoj : R. de SAUSSURE, BOUSQUET. *La Sekretario :* R. MESNY.

Konsuloj kaj Esperanto-Oficoj

Jen la teksto de la deziresprimo akceptita en la ĝenerala kunveno de la konsuloj, Esp. Oficoj, Informejoj, k. c. (Cambridge 16 Aŭgusto) kaj poste unuanime voĉdonita de la *tuta kongreso* (17 Aŭgusto).

La konsuloj kaj delegitoj de la publikaj Esperanto-Oficoj, Esperantistaj Informejoj, Agentejoj, k. c., kunvenintaj Mardon 13 kaj Vendredon 16 Aŭgusto 1907 en Cambridge, konstatas plezure ke, laŭ la enketo farita de S-ro Meyer, konsulo en La Rochelle, tiuj organizaĵoj fonditaj post la deziresprimo de la Geneva Kongreso estas proksimume 200. Post raportoj de S-roj Duchochois, Meyer kaj Rousseau, la kunveno decidis uzi tiujn ĉi raportojn por eldonigi broŝureton, kiu estos uzata kiel gvidilo por la kreado kaj uzado de tiaj institucioj. La kunveno ankaŭ petas, ke la kongreso bonvolu voĉdoni pri jena deziro[1] :

1° La Esperantistaj grupoj, societoj, kluboj, k. c. estas petataj instigi en sia loko la kreon de la supreditaj institucioj, se ili ankoraŭ ne ekzistas, sekvante laŭeble la ĝeneralan planon priskribotan en tiu broŝureto.

2° La Esperantistoj kutimiĝu uzi la servojn de tiuj organizaĵoj kaj instigi la publikon esperantistan kaj neesperantistan, ke ĝi ilin uzu.

LIGO INTERNACIA

DE LA

AĈETANTOJ ESPERANTISTAJ

En n° 7 de « Esperanto » mi pripensis la utilon, kiun povus fari por nia Esperanto tia ligo. Mi provis montri, ke la jamnunaj fortoj de l'Esperantistaro sufiĉus plene, ke ni bezonus por tio nur bonan volon kun iomete da obstino kaj mi invitis ĉiun samideanon al kunhelpo. Sed krom unu aŭ du esceptoj, neniu montris seriozan intereson, la tuta afero ŝajnis esti iom forgesita en Esperantistujo. Tamen la boneco de l'ideo jam ne permesas al mi silenti ; mi pripensis, parolis kun amikoj ; la kreo de l'dirita Ligo ŝajnis al mi ĉiam pli farebla ; kaj, iun matenon, mi decidis fariĝi mem fondonto liga, kaj, vespere, je la sama tago, la ligo estis fondita. Kara leganto, ne timu, eĉ ne miru pro tia rapideco, ĉar Ligo internacia de la aĉetantoj Esperantistaj kalkulas ĝis nun nur unu anon. Sed mi konvinkiĝis, ke ĝi, estante tute sendeviga, senpaga, kaj, komence almenaŭ, senregularo, ekzistas ja nur per la agado de siaj anoj, kaj mi vidis nenion, kion povus malutili la tuja komenco de la praktika liga agado. Ĉiu homo civilizita bezonas ŝuojn de tempo al tempo ; hazarde la samo okazis al mi je la fondiĝa tago de L. I. A. E. kaj, utiligante tiun ĉiuhoman bezonon al la alta celo de Esperanto, mi en gazeto serĉis la adreson de iu magazeno de ŝuoj kaj skribis la jenan poŝtkarton :

« Sinjoroj. — Estante ano de Ligo Internacia de la Aĉetantoj Esperantistaj, mi petas vin sendi al mi vian katalogon pri ŝuoj kaj botoj por sinjoroj... » kaj sube mi skribis ankoraŭ (en la nacia lingvo de l'adresato) « La Konsulo de Esperanto en nia regiono, S-ro X. X. tradukas kaj respondas senpage ĉi tiun karton ».

Jen estas do la unua vivsigno de mia nova fondaĵo, kio alvenis nun ? Se vi opinias, ke la poŝtkarto iris paperujon, vi tute eraras. La firmo rapidis, eĉ rapidegis sendi la deziritan katalogon, kaj du tagojn pli poste, mi skribis duan karton al la sama adreso. Jen ĝi estas :

« Sinjoroj. — Sendu al mi kiel eble plej baldaŭ paron da ŝuoj, kataloga numero 69a, plej bona kvalito, po la prezo de X..., kontraŭ poŝta repago... ». Mi certigas, ke la dua karto estis ankoraŭ pli ŝatita ol la unua ; jam du tagojn post la mendo, mi estis feliĉa posedanto de bela paro da ŝuoj, eble la unuaj Esperante menditaj. Kion celas nun la rakontado de tiu historio pri mia ŝumendo ? Kara leganto, ĝi celas pruvi, ke vi, vi mem, povas preskaŭ ĉiutage, ĉiutage propagandi Esperanton efike, tre efike, ne elspezante eĉ unu speson ; ke, post tio, vi bezonas esti nek milionulo, nek eminentulo, sed nur simpla multbezonanta homo kaj bona Esperantisto, kiu propagandas Esperanton eĉ tiam, kiam tio nenion kostas. Plie, ĝi celas montri, ke la aliĝo al L. I. A. E. estas la plej simpla afero en la mondo ; oni bezonas nur voli. Kaj fine, por kiel eble plej multe kuraĝigi la aliĝontojn, mi fordonas de la hodiaŭa dato ĉiun rajton de aŭtoreco pri tiu ligo ; ĉiu Esperantisto rajtas meti la frazon : Estante ano de L. I. A. E. k. t. p. en siaj leteroj, kaj mi deziras, ke la Esperantistoj multe uzu tiun rajton.

Ĉiam antaŭen.

(1) Tiu deziro estis poste aliformigita en deziron de la *Kongreso*.

KONSULAJ INFORMOJ

Bourg (Ain-Francujo. — Nia *Publika Esperanto-Ofico* eldonigis, kun la helpo de la Iniciata Sindikato, beletan ilustritan gvidlibreton pri la departemento Ain. Por ricevi ĉi tiun gvidlibreton, sendu 15 cent. (6 Sd) por la poŝtelspezoj. Ni estus tre dankaj al ĉiuj Pub. Esp. Of., Esp. konsuloj, grupoj kaj societoj, kaj ankaŭ al privataj esperantistoj, ke ili bonvolu disdoni, konigi tiun ĉi gvidlibreton al la esperantistoj, kaj ĝin traduki nacien al la neesperantistoj de sia regiono en la esperantistaj kunvenoj, kursoj, paroladoj, kongresoj kaj ekspozicioj. Ekzempleroj estos sendataj al ili laŭ peto. Ni ankaŭ petas, ke ili bonvolu traduki el Esperanto nacien kaj el nacia lingvo en Esperanton, la leterojn, kiujn ili ricevos de ni por neesperantistoj aŭ kiujn neesperantistoj dezirus sendi al ni. Niaparte, ni firme promesas fari al ili la samajn servojn (disdonado de komercistaj esperante redaktitaj prospektoj, tradukoj de leteroj, k. c.).

Ni fine estos tre dankaj al tiuj el ili, kiuj konsentas kun ni pri la ĉi-supre diritaj reciprokaj servoj, ke ili informu nin pri tio poŝtkarte. Ni ilin enskribos en la listo de la korespondantoj de nia Publika Esperanto-Ofico.

Por ricevi ĉiujn informojn pri turismo (somerrestadoj, ekskursoj, vintraj sportoj), komerco (mondfamaj kortbirdoj), industrio (juveloj, terkulturaj maŝinoj, k. c.) skribu laŭ jena simpla adreso : *Esperanto-Ofico Bourg*.

LA TRIA KONGRESO

(Sekvo)

Aliaj specialaj kunvenoj.

La kunveno por la traduko de la *Biblio* elektis tripersonan komitaton : S-roj Rust, Peltier, Schneeberger. Oni esprimis la deziron, ke D-ro Zamenhof traduku la malnovan testamenton. S-ro Evstifeijeff proponis el doni siakoste gazeton por prepara laboro.

La Instruistoj fondis Ligon kaj decidis baldaŭ eldoni propran revuon.

La *Juristoj* kunvenis dufoje por priparoli internajn demandojn.

La *Blindhelpantoj* proponis, ke la grupo de ĉiu urbo faciligu la akiron de Esperanto al unu siaurba blindulo.

La *Marista Ligo* definitive fondiĝis (pliposte raporto).

La *Medicinistoj* aliĝis al la Scienca Asocio, kiel memstara grupo.

La *Muzikistoj* societe kuniĝis sub prezido de S-ro de Ménil.

La *Jurnalistoj* disputis internajn aferojn, krom tio, kunvenis pacifistoj, ruĝuloj, ruĝkruculoj, militistoj kaj ĉiuj naciaj societoj kaj reprezentantoj.

DIVERSAĴOJ.

La blinduloj. — Dank'al malavara kunhelpo, proksimume 16 blinduloj apartenantaj al 6 nacioj ĉeestis la kongreson. Kortuŝantan spektaklon prezentis la ĝojo de tiuj malfeliĉuloj meze de ilia kara Esperantujo. Ni esperas, ke en la venontaj kongresoj ĉiam pli granda nombro de blinduloj alveturos.

La ekspozicio. — Kiel kutime ekspozicio estis organizita. La nombro de la libroj, gazetoj kaj reklamoj estis grandega kaj la ĉambro ne sufiĉis por enteni ilin. Ni rimarkis ŝatindan nombron de gvidlibretoj, reklamoj komercaj, k. t. p. Rimarkinda estis la loko rezervita al la blinduloj.

La festenoj. — La plej multaj kongresanoj manĝis en la Grenvendejo. La organizo de tiu apartajo kiel tiu de la loĝejoj estis bonega. Je la manĝhoroj la halo prezentis vere ĝojigan vidajon.

La gazetaro — Tre multaj gazetoj, ĉu anglaj, ĉu fremdaj parolis pri nia kongreso, eĉ detale. Preskaŭ ĉiuj artikoloj estas favoraj kaj aperis en gravaj jurnaloj. Por raporti pri tio, longa artikolo estus necesa.

ESPERANTISTA MARISTA LIGO

Tiu temo ankaŭ okupis la kongresanaron ; la graveco de la disvastiĝeco de nia lingvo en tiu tre speciala fako estis klarigata en ĝenerala kunveno, laŭ la vidpunkto de la efiko rilate al la tutmonda propagando kaj la jena tagordo estis alprenata unuvoĉe : *La Kongreso aprobas la kreon de Esperantista Marista Ligo kaj insistе admonas la havenajn grupojn, ke ili vigle helpu la agadon de tiu Ligo*. Estis do decidata, dum specialaj kunsidoj, la kreo de tiu Ligo, laŭ la plano jam presita en № de ESPERANTO de la 12a Junio. Nuntempe la komitatoj formiĝas kaj baldaŭ estos pretaj ricevis la aliĝojn. Ĉiujn informojn donos nia jurnalo pri la nacioj komitatoj kaj korespondantoj.

Internacia Unuiĝo de la Studentoj (I. U. S.)

Oficiala Informilo

La *Internacia Unuiĝo de la Studentoj* (*I. U. S.*) celas : 1e La uzadon kaj disvastigadon de la internacia lingvo Esperanto inter la studentaro ; 2e La alproksimiĝon kaj interkomunikiĝon de la studentoj el ĉiuj nacioj. La jara kotizajo estas 3,50 frankojn (Sm. 1,40). ESPERANTO estas la oficiala organo de la dirita unuiĝo kaj enpresas la avizojn, kiuj koncernas ĝin. La anoj de la I. U. S. regule ricevos la jurnalon sen plua pago. La sciiĝojn pri aliĝo oni sendu al la *prezidanto* : S-ro Wichert, Borchofstr. 6-II, Konigsberg (Germanujo). *Sekretario* estas S-ro A. Vincenneux, Lycée de Troyes (Aube-Francujo). La kotizajojn oni sendu al la *kasisto* : S-ro R. Saković, Novograd-Volynsk-Volinskaja gub. (Rusujo) aŭ al ESPERANTO, 8, rue Bovy-Lysberg, *Genève* (Svisujo).

***

Al ĉiuj studentoj-samideanoj. — Mi tre petas vin, karaj kolegoj, respondi al la jena demando (tre grava por la sukceso de nia batalado) : *Kiajn ilojn de propagando inter studentaro vi proponas ?* Kun plezuro mi ricevus ĉiujn opiniojn : kolektinte ilin, mi aperigos la resumon en ESPERANTO.

R. Saković, *Novograd-Volynks* Volinskaja gub. (Rusujo).

***

Novaj aliĝoj. — 32, S. Iamasaki, Universitato, *Kioto* (Japanujo). — 33, Gordon Thomson, 143, Crescent Rd. *Toronto* (Kanado). — 34, E. Haij, *Zölkiew* (Aŭstrujo). — 35, S, Poltavskij, 6 Mal. Zatonnaja, *Saratov* (Rusujo). — 36, A. Joaquim de Silva, 57, Arcos do Jardin, *Coimbra* (Portugalujo). — 37, W. de Serber, 2 r. de Convert, *Neuchâtel* (Svisujo). — 38, R. Felser, Klosterwiess, 46, *Gratz* (Aŭstrujo). — 39, F. Beck, villa Ulmberg, *Zürich-II* (Svisujo). — 40, M. Robin, 43, r. des Postes, *Lille* (Francujo). — 41, Gunvar Lövfenmark, 11 Johannesgatan, *Upsala* (Svedujo). — 42, A. F. Bikov, Teknologiĉesky, *Tomsk* (Rusujo). — 43, Jorgen Juul, Frederiksborgodt 41, *Kopenhagen* (Danujo). — 44, Sigm Glahn, Odinsberg 17, *Frederiksborg* (Danujo) — F-ino Corrie (*helpa ano*) Koningstraat, *St-Gravenhaage* (Holando). — 46, E. A. E. Pettersson, Kungsgatan 12, *Upsala* (Svedujo). — 47, Karl Jahn, *Waidhofen a/ Th.* (Aŭstrujo). — 48. — A. Siebenschein Maximilianplatz 13, *Wien-IX* (Aŭstrujo). — 49, F.-J. Mavalik, *Komárom* (Hungarujo). — 50, Jullien Augustin (*helpa ano*) *Voiron* (Isere-Francujo). — 51, H. Drewes (reprezentanto por Germanujo) Gneisenaustr. 26, *Berlin S-W.* (Germanujo). — 52, F. Karpinski, Borchenstr. 6, *Königsberg II* (Germanujo).

ANONCETOJ

Kosto. 8 spesdekoj (20 centimoj, 2 pencoj, 10 pfenigoj) por ĉiu linio.

Rabato de 25 % por 6 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtos enpresigi 3 liniojn unufoje senpage.

Oni sendu al ni la anoncetojn antaŭ la 5 kaj 20 de ĉiu monato, aldonante la monon. Poŝtmarkoj estas akceptataj. Oni skribu plej legeble.

London (Anglujo). S-ro H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Road, deziras korespondi pri interŝanĝo aŭ aĉeto de malnovaj Esp. jurnaloj.

« **Saturday Evening Tribune** », la plej granda grava amerika ĉiusemajna jurnalo socialista, deziras esperantistajn korespondantojn en ĉiu lando pri la labora kaj socialista movadoj. Redone oni sendos la jurnalon. (En ĉiu № esperanta artikolo). Sin turni al Ch.-E. Randall, 1522 First Ave., Seattle, Wash. U. S. A. (Unuiĝitaj Statoj).

Prag-Zizkov (Aŭstrujo). — S-ro J. Jenĉ, Havliĉkova 37, deziras interŝanĝi vidajojn kun alilandaj gesamideanoj ; ĉiam respondos !

Beaune (Côte d'Or, Francujo). — D-ro A. Vesoux vendas je *moderaj prezoj* ordinarajn kaj *famajn vinojn*, kiujn li rikoltis.

Paris (Francujo). — S-ro Michaud, 13 Avenue de Saint-Mandé, tre deziras korespondi kun *inĝenieroj* pri konstruo de pontoj, tunelaj, fervojoj k. d. p. Li respondos al demandoj pri la Pariza Urbfervojo.

Praha II (Aŭstrujo). — S-ro A. Zahel, Táborská, 19, deziras interŝanĝi ilustr. kartojn kaj markojn kun ĉiuj gealilandanoj; ĉiam tuj respondas !

Verdun (Meuse-Francujo). — S-ro Adam, Agento de « Esperanto », 2, rue des Rouyers, deziras korespondi kun fremdaj gesamideanoj.

La Guardia (Jaén-Hispanujo). — S-ro S. Baudin Agüero deziras korespondi kun ĉiulandaj *geinstruistoj* pri *pedagogio*.

Taillette-Roorol (Ardennes-Francujo). — S-ro Heripret deziras korespondi pri *vivado de terlaboristoj* kun *svedoj* kaj *angloj*.

Lyon (Francujo). — Junulo dudeksesjara deziras *edziĝi* kun komercema kaj vojaĝema Esperantistino ; li konigos sian celon kaj intencojn, konigante sian nomon kaj adreson al ĉiu skribintino al : Livret Caisse d'Epargne nº 269.135, 140 poste restante, Lyon Grolée.

Oni estas petata skribi nur seriozeme.

Martinsberg (Aŭstrujo). — S-ro Thalinger deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Kazennaja Palata (gub Voronej. Rusujo. — S-ro Vasiljef Aleksandro, Esperantista konsulo, bezonas interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiulandaj Esperantistoj. Petas la poŝtkartojn kun portretoj de l'fama homoj de ĉiuj landoj kaj epokoj.

Douai (Francujo). — S-ro Henry Coppin, 3, rue François Cuvelle, deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj kun Esperantistoj el ĉiuj landoj.

Plzèn (Bohemujo-Aŭstrio). — S-ro A. Stetina, Faborsha, 491 kaj S-ro Silpoch ul. pod Homolkon 8, deziras korespondadi kun fremlandaj esperantistoj ; ĉiam respondos.

Basel (Svisujo). — S-ro A. Bader, Frobenstrasse 56, deziras korespondi letere kun ĉiulandaj samideanoj por interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiam respondos.

La **Esperantista Societo « Espero »** en Franzendorf apud Reichenberg, intencas aranĝi grandan ekspozicion esperantistan en Fransendorf en Hotelo « Venedig » (28an septemkro ĝis 6an de oktobro 1907). Por tiu ĉi celo, ĉiuj samideanoj estos petataj bonvolu sendi interesajn Esperantistajojn, komercajn prospektojn k. t p. kaj invitos por inda vizito.

Smirice n/L. (Aŭstrujo). — F-ino Adda Peŝakova. sukerfabriko, deziras interŝanĝi il kartojn kun ĉiuj gealilandanoj ; ĉiam kaj tuj respondos.

Halle a/S. (Germanujo). — S-ro S. Schad, instruisto, 3 Sudstrasse, deziras korespondi kun fremdaj gesamideanoj ; ĉiam respondos.

Voiron (Isère-Francujo). — F-ino Jullien multe deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

Bobrov. (gub. Voronej-Rusujo). — S-ro Voldemaro Maksimov, petegas ian *oficon alilandan*. Finis Uuiversitat. jurist., *scias* Esperanto, lingv. franc., grek., latin., nemulte angl., german., kaj fotografarton.

Angers, (France) — S-ro Georges, 9 rue des Doëliers, interŝanĝas poŝtkartojn (vidajojn kaj kostumojn) ; ĉiam respondos per plej belaj poŝtkartoj de vidindajoj.

Dresden-N. (Germanujo). — S-ro H. Bär, Wiesentorstr. II, deziras interŝanĝi vidajojn, leterojn kun gesamideanoj. Mi estas filateliisto.

Königsberg-Ostrpr. (Germanujo). — S-ro Ernst Wichert, Borcherstr. 6. II, stud. rer. tekn. deziras korespondi pri *teknikaj* aferoj per bildpoŝkartoj, fotografajoj aŭ letere.

London (Anglujo). — H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Town, deziras aĉeti : *La Esperantisto*, 1889 ĝis 1895, jarkolektojn aŭ eĉ apartajn numerojn. Ankaŭ *Lingvo Internacia*, jarkolektojn nebinditajn, 1897, 1899. Ankaŭ deziras ricevi po unu ekzemplero de sekvantaj : *Espérantiste Canadien*, *Kalejdoskopo de Esperantistoj*, *L'Espérantiste* (Aldono al Grand Sténographe, 1896), *La Stenografiisto*, *L'Esperanto*, (Nurnberg, 1889), *Mondlingvisto*, *Munĥena Esperantisto*, *Revue des Nations*. Ĉiu Grupo kiu eldonos novan gazeton estas petata sendi sciigon. *NE* deziras interŝangi poŝtkartojn ilus.

Signoj esperantistaj ĉiuspecaj :

Steloj verdaj, flagoj blankaj, el bona emajlo, dauremaj, bone fabrikitaj

Por societoj po 100 ekzempl. Fr. 24,00 riceveblaj ĉe

A H. Rüdolf, Reichenberg, Bohemujo.

Oni postulu prezaron specialan.

LIBRAIRIE HACHETTE & Cie
Boulevard St-Germain, 79, PARIS

LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto en lingvo Esperanto

redaktata kun la konstanta kunlaborado de

Dro L. L. ZAMENHOF

kaj de eminentaj esperantistoj de ĉiuj landoj

48 paĝoj da plej bona teksto in-8, ĉiumonate !

Jara Abono

Francujo. . . . Fr. **6** | Ceteraj landoj. Fr. **7**

Unu numero : **50** centimoj.

LINGVO INTERNACIA

Centra Organo de la Esperantistoj

eliranta la 15-an de ĉiu monato

La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita en 1895

ADMINISTRACIO :

Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris

JARA ABONO :

Sen Literatura Aldono 5 fr. — Kun Aldono 7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla

TRA LA MONDO

La fama FAMILIA Gazeto, VERE Internacia

Ĉiuj Temoj pritraktitaj de specialistoj.

Ĉiuj Landoj priskribitaj de samlandanoj.

Multraj Ilustraĵoj speciale difinitaj por la Gazeto.

Aperas regule kaj akurate monatfine.

POSTULU **TRA LA MONDO** ĉe ĉiuj **francaj stacidomoj**

ABONU (8 fr. jare) ĉe la **postoficejoj** belgaj, danaj, francaj, holandaj, italaj, norvegaj, portugalaj, svédaj kaj svisaj, kaj ĉe la

Administracio : Meudon (S.-et-O.) France.

Petu senpagan Numeron !

Liverantoj de Mustardo kaj Amelo al la Regio

Laŭ privilegio

J. & J. COLMAN

MANUFAKTURISTOJ DE (Akcia Societo)

MUSTARDO, AMELO, BLUIGAJO

KAJ

BRITA RIZFARUNO

108, CANNON STREET, LONDON
kaj CARROW WORKS, NORWICH (Anglolando)

Monata kroniko

Aŭgusto 1907.

Marokujo denove alcentrigas la atenton de la Eŭropa diplomataro. Francujo estis devigata denove militagi por revenĝi sin pri la kruela mortigo de siaj anoj kaj asekuri la protektadon de siaj regnanoj sur la Maroka tero. Tiun ĉi fojon, neniu el la Eŭropaj regnoj faris opozicion, ĉar Francujo donis la certigon, ke ĝi agos konforme al la akto de Algesiras kaj ne preteriros la limojn, kiujn trudas al ĝi la protektado de ĝiaj enlandanoj. La Maroka imperio estas cetere en plena anarĥieco ; tri sultanoj, ne enkalkulante aliajn pli malgravajn pretendantojn, disputas inter si la superan potencon kaj regas ĉiu parton de l'lando. La Franca armeo militokupis Casablanca, sed el diversaj flankoj oni instigas ĝin okupi la tutan landon — kio estus riskoplena entrepreno, pri kiu bone konscias la Franca popolo, ĉar ĝi elvokus novajn internaciajn komplikajojn kaj fakte nuligus la akton de Algesiras.

Malgraŭ la somero, ŝajnas, ke neniam la vivado diplomata estis pli agema. La vizitoj de la monarĥoj kaj registoj unu al la alia estas sennombraj : renkontiĝoj de Vilhelmo IIa kun la Caro, de Vilhelmo IIa kun la reĝo de Anglujo, de la reĝo de Anglujo kun S-ro Clemenceau, de la ministro de la eksteraj aferoj de Italujo kun tiu de Aŭstrujo, de princo Bülov kun S-ro Cambon, ambasadoron de Francujo, vizito de l'reĝo de Siamo al Parizo, k. t. p. Post ĉiu el tiuj renkontiĝoj, la politika gazetaro informas nin per kelkaj senkoloraj frazoj, ke la intervizitantoj reciproke parolis pri ĝenerala politiko kaj alvenis al plena konsento pri ĉiuj traktitaj punktoj, ke sekve Eŭropo havas antaŭ si longan periodon de senminaca paco... Kio fariĝus al la politika gazetaro, se tiuj plenaj konsentoj estus tute veraj ? Feliĉe, por ĝi, en fako diplomatia pli ol en ĉiuj aliaj la absoluteco ne estas atingebla... Kio ajn estas, oni ne povas dubi, ke tiuj vizitoj estas signo, se de ne paco, almenaŭ de interkonsentemo, kvankam oni ĝenerale multe trograndigas ilian signifon. La demando Maroka ne elvokas tiel akran malkonsenton kiel antaŭ unu jaro, kaj ŝajnas, ke Germanujo, kaj tiom pli certe la aliaj regnoj, lasas al Francujo rilatan liberecon de agado en tiu ĥaosa lando kie nin atendas sendube ankoraŭ multaj surprizoj.

La Haga konferenco baldaŭ finos siajn laborojn ; pozitivajn rezultatojn ĝi, kiel atendite, ne donos. Tamen, pro formo, ĝi akceptis pure teorian deziresprimon pri limigado de l'armado kaj nun estas klasiganta la aferojn, kiuj estos submetataj al la deviga arbitracio — io, kiu ŝajnas ankaŭ tre teoria. Oni vidas, ke per siaj decidoj la solena konferenco ne kaŭzos tre atentindan ŝanĝon en la vivado tutmonda. Dum kelka tempo, pli interesis la publikon la internacia socialista kongreso de Stuttgart, kie okazis longa disputado pri agado antimilitarisma, sekve de la ideoj de l'Franca socialisto Hervé kaj kie ree montriĝis antagonismo inter Germana kaj Franca socialistaro. Notinde estas, ke la kongreso malakceptis la principon de koloniigado. Pri la agado antimilitarisma oni akceptis neŭtralan deklaracion, kiu estis konsentita de ambaŭ interdisputantaj partioj.

La enlanda vivo ne estas nun tiel agema kiel la internacia, ĉar preskaŭ ĉiuj Parlamentoj estas fermitaj kaj la politikistoj reakiras novajn fortojn ĉe la kontakto kun la naturo ; ni post kelka tempo baldaŭ vidos la rezultatojn de ilia meditado.

A. R.

PAROLO DE DRO L. L. ZAMENHOF

en Guildhall-Londono

la 21an de Aŭgusto 1907

(Eltirajoj)

...Multajn fojojn mi ripetis, kaj en Bulonjo mi tion ĉi proklamis per oficiala deklaracio, ke la esperantismo celas nur al tio, ke ia taŭga kaj vivipova komprenilo inter la popoloj *ekzistu*, sed ke la *formo* de tiu komprenilo estas por ni-aŭ almenaŭ por mi persone — tute indiferenta ; ke se, anstataŭ fari konstantajn kaj senfinajn eksperimentojn kaj teorian rezonadon, ni decidis elekti la pretan kaj elprovitan lingvon Esperanto kaj labori speciale kaj ekskluzive por ĝi kaj fiksi por ĝi netuŝeblan fundamenton — ni faris tion ĉi ne ĉar al ni plaĉas speciale Zamenhof kaj lia verko baj ne tial, ke li volas esti ia papo, kiel mensoge kredigas diversaj niaj kontraŭuloj — sed nur tial, ke la esploro kaj sperto montris al ni ke tia maniero de agado estas la sola kiu plej certe alkondukos nin al nia celo. Ekzistas personoj, kiuj penante deklini nin de nia vojo, havas la plej bonan kaj plej honestan intencon ; ili estas tre sindonaj al nia afero, sed ili pensas, ke se ni faros tiujn plibonigojn, kiujn ĉiu el ili proponas, nia afero estos multe plibone. Pri tiuj personoj ni estas konvinkitaj, ke pli aŭ malpli frue ili komprenos sian eraron ; ili komprenos, kiel danĝeraj estas iliaj proponoj en la nuna tempo, kiam ni antaŭ ĉio — bezonas plej severan unuecon, kaj ili pacience laboras kun ni laŭ la voj'elektita ĝis tiu tempo, kiam la estonteco de nia afero estos absolute ekster danĝero. Sed ekzistas aliaj personoj, kiuj laboras simple por detrui ; al tiuj sinjoroj, kiujn nia bele elkreskinta arbo ne lasas dormi kaj kiuj per ĉiuj vortoj penas ĝin subfosi, ni vokas : se vi havas alian vojon, kiu povas nin konduki al nia celo pli bone kaj *pli certe,* montru ĝin al ni, kaj ni ĝin sekvos. Sed vi scias, ke vi proponas ne ion pretan kaj certan, sed nur supozojn kaj teoriajn opiniojn ; vi scias, ke la akcepto de via tre duba kaj baldaŭ siavice kritikota plibonajo ruinigus la laboron de dudekjara disciplina kaj sukcesa laborado de miloj da personoj kaj nenion kreus anstataŭ ĝi ; vi scias, ke se ni dekliniĝus de nia disciplina vojo kaj lasus fali Esperanton, tiam la konfido de la mondo por la ideo mondolingva, konfido fine akirita post centoj kaj miloj da faroj de nekredado, pereus por ĉiam kaj jam neniam povus esti reakirita ; vi ĉion scias, kaj tamen vi per ĉiuj fortoj penas senkreditigi nin en la okuloj de la mondo... Bone, daŭrigu do vian Herostratan laboradon, kaj ni iros trankvile nian vojon.

La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Car tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro ! Dum la pseŭdo-patriotismo, t. e. la genta sovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si. Ciu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos ; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni la ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo — tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton « amo », ĉar en via buŝo la sankta vorto « amo » malpuriĝas.

Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon ! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj ! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis !

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiujn ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en ĉi tiu ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata estas « esperantistoj ».

Plej bone ridas, kiu laste ridas[1]

Duakta Komedio *(sekvo)*

Sceno 4a

(La onklino rapide eniras, kun la bileto en la mano). Vere, ĉu mi bone legis. Jen letero, per kiu mi ekscias, ke li alvenis. Li estas en hotelo, Arlinjo, rapidu, ke mi anoncu... *(Arlinjo ekmontras sin).* Jen, li revenis... li estas tie.

A. — Kiu. Kio do ? = *L.* — Alkibiado. = *A.* — Alkibiado ? = *L.* — Jes, mi ĵus trovis tiun leteron en la kesto... Ho, mia koro saltas de ĝojo ; vi vidas, ke mi bone faris, haltigante vin en tiu fatala inklino.

L. — Tiuj principoj pri edukado estas fantazia preteksto. Vi povus trovi ion pli bonan.

A. — Nun, jen alia afero. Rapide pretigu tablon, salonon. Aranĝu la florojn, en la okazo se li alvenus. Sed, ĝuste nun iu sonorigas... Se li alvenus...

La servisto. — Fraŭlino, jen persono, kiu parolas strangan lingvon.

L. — Jen li, jen li ; mi iras lin akcepti. *(Alkibiado aperas).*

Sceno 5a

Alkiabado (*Esperante*). — *Cu estas tie la domo de fraŭlino Lizo M... Ha, mia onklino mi supozas...*

L. — Vi estas mia nevo, mia kara nevo, sed kiun lingvon vi parolas ?

Al. — *Mia onklino, permesu, ke mi* (Likisas).

L. - Dio mia, kion li diras. Provu paroli al li angle aŭ germane. (*prezentas Arlinjon*). Jen via kuzino...

Al. — *Mi parolas nur portugale kaj Esperante. Cu iu tie povas kompreni la helpan lingvon ?*

A. — Onklinjo, mi komprenas, ke li konas nur portugalan kaj Esperantan lingvojn.

L. - Kiel ni do komprenos nin reciproke. (*ŝi proponas seĝojn*). Sidigu vin (*li sendube scios germanan aŭ anglan*). *Do you speak English ?*

Al. — (*nee signante per la kapo*). — *Ne, nur Esperante.*

L. — *Sie können auch kein Deutsch ?*

Al. — *Ne, nur Esperante. Mi lernis ĝin por vojaĝi.*

L. — (levante la brakojn al ĉielo). Kion li diras, kiel kompreni... Mia nevo...

Ar. — Onklinjo mi bezonus interpreton.

L. — Estas neagrable... tiel ĝoji kaj ne povi interparoladi kun li. Kion fari ?

A. — Ekzistus rimedo. Jes, bona ideo. Filipo konas Esperanton kaj povus lin kompreni.

L. — Iru serĉi lin tuj.

A. — Eble, li ne estas hejme.

L. — Mi vidos de mia balkono. Mi mem lin vokos (ŝi vokas). S-ro Filipo, venu momenton, ni bezonas vin...

F. — Mi alvenas, alsaltas... (*li envenas*).

Sceno 6a

L. — Jen mi prezentas al vi mian nevon Alkibiado, kiu ĵus alveturis. Li parolas strangan lingvon. Provu vian Esperanton kaj traduku, mi petas.

F. — (*aparte*) Mi do denove havas favoron (*al la fremdulo*). *Ha, sinjoro, kiel vi pensas ke ni devas eliri el tia situacio ? Ŝi ne komprenos ion de niaj paroloj. Diru, ke mi ne povas restadi.*

L. — Kion li diras ?

F. — Li unue diras, ke li estas fianĉo kaj ne povos tuj elekti tien pro aferoj. Li nur faras al vi sian unuan viziton.

L. — Cu eble, li diris tion. Estas belege, ke vi komprenas ĉion ĉi tiel rapide.

A. — Ha, ĉu mi ne diris, ke ĝi estas lingvo mirinda ?

L. — Jes, oni ĉiam deziras pruvojn, kaj li estus fianĉo ?

Al. — *Diru, ke mi veturas Eŭropon por aĉeti meblaron.*

F. — *Jes, sed vi devas iri baldaŭ, mi terure timas ekridegi.*

L. - Ho, diru tiujn karajn parolojn. Li parolas pri mia fratino, mia kara fratino ?..

F. — Li diras, ke li estas tiel laca, ke li parolos pri ŝi ĉe sia reveno. Li havas ankoraŭ traktotan aferon.

L. — Ho, kia domaĝo ! li ne povas resti. Diru al li, ke mi instalos lin tien ĉi kiam li volos.

F. — *(al Lemo) Pro l'amo al Dio, nun foriru ; mi frenezas, mi ne povas plu haltigi mian ridon.*

Al. — *Jes, jes, mi tre dezirus resti, sed mia onklino permesu, ke mi foriru.*

L. (pergesto). — Mi komprenas... Finu rapide vian aferon kaj revenu. S-ro Filipo, akompanu lin ; vi estos lia interpreto. (*ili foriras*).

A. — Mi forkuras onklinjo, mi tuj iras pretigi la plej belan ĉambron, ĉu ne onklineto... ĉar li estas fianĉo kaj Filipo pruvis al vi, ke Esperanto...

L. — Jes, ĝi tamen estas valora lingvo, laŭ mia konstato... Vi havos vian Filipon, sed iru rapide ; mia kapo estas disbatita de tiaj okazintajoj (*ŝi falas sur seĝon*).

Servistino. — Fraŭlino, jen la kuriero.

L. — (*momenton silenta*). Bone, metu ĝin tien. (*post momento*). Mi enrigardu iom. La Gazeto de l'Paco, la Informilo de l'Tago... Jen, Amerika poŝtmarko ; ĝi sendube estas la anonca letero de Alkibiado ; li venis antaŭ ĝi, sed li estis min sciiginta... Mi tamen legu : (ŝi legas).

Kara onklino, mi estos ĉe vi morgaŭ vespere ; preparu ĉion. Mi kaj mia edzino tuj instalos min ĉe vin.

L. — Kion signifas ? Li parolas pri edzino, kaj li estis fianĉo, (*ŝi plu legas*) :

Vi rekonos min laŭ mia blonda lipharo bluaj okuloj kiel tiuj de via fratino. (*ŝi haltas*). Kiel ?

Sed li havis nigrajn okulojn, nigrajn lipharojn... kaj li estas blonda. Tiu homo estis do ne li. Oni min trompis. Kion signifas ? Mi tamen ne estas tiel malsaĝa. (*ŝi promenas*). Jes, mi ĉion komprenas. Ha, la perfiduloj !... Mi scios ilin puni. Estas senutile koleregi ; ĉar li havas edzinon, ĉio estas finita. Arlinjo subaranĝis la aferon kun Filipo, tiu Esperanto, kaj ankaŭ S-ro Leono... sed atendu, plej bone ridas, kiu laste ridas. Mi revenĝos min al ili pri tio. (*oni aŭdas kanton*) ŝi estas ĝoja, sen ia bedaŭro. Jen, ŝi venas... Mi kovru mian intencon.

(*Arlinjo envenas*).

L. — Jes, kara mia. Vi estos baldaŭ feliĉa, tial ke la aferoj tiele prezentiĝas, kaj ĉefe se Alkibiabo prokrastas, mi havos la tempon por festi vian fianĉiniĝon, ĉar mi ellasis duonpermeson. Nu, aranĝu la aferon por morgaŭ vespere. Invitu vian amikon Filipo kaj amikojn ; se vi volos, estos ia vespermanĝo.

A. — Ho, onklinjo, kiel mi ĝojas ! Filipo certe kunkondukos sian amikon Leono.

L. — Li kunkonduku lin ; ĉio estos pli gaja. Ni do rapidu, ĉar ni devas multon pretigi.

(Kurteno)

(*Fino sekvos*). S-ino Houriet.

(1) Vidu *Esperanto* no 13 (12 Aŭgusto).

LINGVA FAKO

Novaj Vortoj

La dua eldono de la *Esperanta Germana* vortaro, kiu aperis antaŭ kelka tempo, enhavas ŝatindan nombron da novaj vortoj. Tiuj ĉi novaj vortoj estas *private rekomenditaj* de D-ro Zamenhof en la antaŭparolo de l'citata verko, sed ili *neniel* estas *devigaj*. Tial ke tiuj vortoj estas ofte renkontataj en la Esperantaj verkoj, ni tabeligis la plej gravajn el ili kun mallonga klarigo. Ni flanklasis la vortojn tute internaciajn kaj la esprimojn pure teknikajn.

Adapti (alfari, alĝustigi) ; Adjunkto (helpanto) ; Akcesora (helpa) ; Amatoro (amanto) ; Anticipi (antaŭfari) ; Areo (amplekso) ; Aserti (pretendi, certigi); Asimili (alsimili) ; Aspekto (elvidiĝo) ; Atribui (aljuĝi); Azilo (rifuĝejo). — Bildo (figuro) ; Braceleto (ĉirkaŭmano); — Deklari (deklaracii) ; Derivi (deveni) ; Devii (deflankiĝi) ; Disciplo (instruato) ; Distribui (disdoni) ; — Efemera (mallonga) ; Eklipso (mallumiĝo) ; Ekzakta (preciza, ĝusta) ; — Holdo (parto de ŝipo) ; — Impertinenta (malĝentila) ; Imputi (alkalkuli) ; Inerta (senmova) : Injekti (enŝprucigi) ; Invadi (enokupi) ; — Komuti (ŝanĝi) ; Konciza (mallonga) ; Konsulti (konsiliĝi) ; — Lifto (homlevilo) ; Lukto (batalo) ; — Medio (vivejo) ; Menso (spirito, inteligento) ; Milda (dolĉa, afabla) ; Modifi (aliigi) ; — Padeli (marŝi en ŝlimo) ; Pasivo (komerca ŝuldo) ; Pruda (ĝeneca) ; Pseŭda (falsa) ; — Roko (ŝtonego) ; Socio (genta stato) ; Stulta (malsprita). — Tajdo (marfluo) ; Vervo (bonhumoro, gajeco).

Kelkaj vortoj estas iom ŝanĝitaj :

Diismo (anst, deismo) ; fetiĉo (fetiŝo) ; Kodo (kodekso) ; Kontribuo (kontribucio) ; Konverĝi (konvergi) ; Prostitui (prostiti) ; Specifi (specifiki) ; Stenografi (stenografii) ; Tosto (toasto) ; Vario (variacio).

***

Lingvaj Klarigoj

Ni tie ĉi plezure respondos ĉiujn demandojn gramatikajn, vortajn aŭ sintaksajn, kiujn sendos al ni niaj legantoj, kondiĉe kompreneble, ke tiuj demandoj prezentu ĝeneralan intereson kaj celu punktojn ne tute elementajn.

Al S-ro S. L. Pri la vorto ne. — La vorton *ne* mi metas ĝuste antaŭ la vorto, al kiu ĝi influas. Ekz. ni preferas diri : *li estas ne bona* ol *li ne estas bona*, ĉar *ne* influas la adjektivon bona, ne la verbon esti ; ni ĉiam agas same en tiuj okazoj. Tio cetere estas konforma al la uzo de la ĉefaj lingvoj (er ist *nicht* gut ; he is *not* good ; il n'est *pas* bon). Laŭ niaj rimarkoj, D-ro Zamenhof same agas, kvankam multaj Esperantistoj metas *ne* antaŭ la verbo. Se oni ĉiam zorgas meti *ne* antaŭ la vorto, kiun ĝi influas, tii evitas ofte ĉirkaŭfrazojn. Ekz. *ne* li venis = ne estas li, kiu venis, lu efektive venis sed ne li) ; li *ne* venis (li eble iris, sed ne venis) ; li venis *ne* al ni (li venis al iu alia, sed ne al ni mem) aŭ ne al ni li venis.

Al S-ro H. K. Pri la formoj antaŭ ol kaj antaŭ kiam. — La unuan formon oni trovas ĉe la plej multaj aŭtoroj, sed kelkaj, opiniante ke tia ideo enhavas per si mem aferon de tempo pli ol komparon, anstataŭigas nun ol per *kiam*, kiu estas logike tute bona. Oni memoru, ke en Esperanto la ĝisnuna neuziteco de tia aŭ alia formo ne signifas, ke tia formo estas neuzebla, se ĝi estas per si mem logika kaj konforma al la spirito de nia lingvo. Antaŭ kiam estas en tiu kazo.

Al S-ro R. S. Pri anstataŭi kaj anstataŭigi. Anstataŭi = esti anstataŭ ; anstataŭigi = meti en staton de anstataŭeco

Al S-ro S. W. Pri la afiksoj uzeblaj aparte. — Principe, oni povas uzi ĉiujn afiksojn aparte, ĉar la Esperanta vortaro konsideras ilin kiel memstarajn vortojn, sed kompreneble oni uzas nur tiujn, kiuj starante solaj prezentas difinitan sencon. Praktike, jen la sufiksoj la plej ofte uzeblaj kiel apartaj vortoj kun la aldono de la gramatikaj finiĝoj : ***mal, re, dis ; an, ar, ebl, ec, eg, em, er, et, id, ig, iĝ, il, in, ind.*** La aliajn oni ĝenerale ne uzas, ĉar ili aparte prezentas ne klaran sencon aŭ eĉ nenian sencon (Ekz : ado, boo). Kelkaj personoj uzas ***isto, ulo,*** *ajo*, sed ĉar tiuj sufiksoj montras iun aŭ ion karakterizitan per la radiko, ili sen tiu radiko ne havas sencon. Plie, oni ne rajtas doni al ulo la sencon homo kaj al isto la sencon metiisto. Cetere, oni devas esti plej sin garda en la uzo de tiaj afiksoj aparte, kaj laŭeble, uzi la precizan vorton.

Al la sama. Pri prepozicioj post adverbo kaj adjektivo. — Starigi liston de la prepozicioj, kiujn oni ***devas*** uzi post tia aŭ alia adverbo aŭ adjektivo estas io neebla kaj ne farinda en logika lingvo, ĉar ofte du prepozicioj estas egale bonaj kaj oni ne havus sufiĉan motivon por akcepti unu kaj malpermesi la alian. Oni elektu la prepozicion, kiu ŝajnas la plej logika ; en okazo de plena nescio oni uzu ***je*** (sed kiel eble plej malofte) ; oni ĉiam estos komprenata tiamaniere. Cetere, jen kelkaj ekzemploj de prepozicioj post adj. aŭ adv., sed ili neniel estas devigaj : alterne ***kun*** ; afabla, ĝentila ***al*** (aŭ ***kontraŭ***) ; favora ***al*** ; feliĉa, kontenta ĝoja, glora gaja, kolera, laca, pala ***de*** aŭ ***pro*** (pli malofte ***pri***) ; aparte, ekstere, interne dekstre, sekve ***de*** ; egala, rilata, simila, identa utila, necesa, danka ***al*** ; kulpa, kapabla, avara ***pri*** ; sata ***de*** ; plena ***de (da, je)*** ; preta ***por*** (***al***), supre ***sur***, kune ***kun***, k. t. p.

Al S-ro O. V. Pri la verbigado de ĉiuj adjektivoj. — Por ke oni rajtu verbigi egale ĉiujn adjektivojn estus necese, ke la finiĝo *i* ĉiam estu egala al ***esti***. Kvankam ĝi havas tian sencon en multaj okazoj, ĝi ne ankoraŭ havas ĝin ekskluzive. Tial ni opinias, ke la verbigado de ĉiuj adjektivoj, kvankam ĝi estas alloga, ne estas io, kiun ni devas *nun* sisteme fari, ĉar ĝi estus danĝera paŝo al la verbigado de la substantivoj kaj tial ke nia lingvo ne havas precizajn regulojn de derivado, tio kaŭzus gravan konfuzecon. Nur la uzado povos iom-post-iom enkonduki tiujn formojn (bonas, belas) laŭ la bezono, sed tuj verbigi ĉiujn adjektivojn estus danĝere kaj kontraŭ la ĝisnuna evoluado de nia lingvo.

H.

EKZERCETOJ

En la Poŝtejo

Pardonu, Sinjoro, ĉu vi povas montri al mi la vojon al la ĉefa poŝtejo ? ĉu estas ankoraŭ malproksime ĝis la... strato ?

Se vi marŝas rapide, vi bezonos proksimume duonon da horon ; kvaronon per la tramvojo. Sed tute proksime, tuj en la unua strato dekstre, estas poŝtoficejo se vi ne volas nepre iri al la ĉefa poŝtejo.

Koran dankon ! Tiam mi iros al tiu ĉi oficejo ; ĝis kiam estas malfermita la poŝtejo ?

Donu, mi petas, kvin markojn po kvin spesdekoj, unu po dek kaj tri poŝtkartoj po tri.

Jes, ĝi faras kvardek kvar spesdekojn. Kion kostas la afranko de letero por Francujo.

Unu spescento po 15 gramoj.

Ĉu vi havus la afablecon pesi tiun ĉi leteron ? ĉu ĝi pezas pli ol 15 gramojn ? Ne, la afranko estas ankoraŭ afrankita. Cu mi devas alglui la markon ?

Jes mi petas.

Ne vere, neafrankita letero kostas la duoblon de la mankanta afranko ?

Jes, prave.

Kia estas la kosto de rekomendita letero ?

Unu spescento.

Mi dezirus forsenti poŝmandaton. Al kiu fenestreto mi devas iri ?

Al la fenestreto 3a, kontraŭe.

Telegram-formularon, mi petas.

Kiom kostas la vorto ?

Tio dependas de la loko de alsendo.

La telegramo iras al X. Estas en Aŭstrujo.

Kvin spedekoj po vorto. Kvar dek vortoj faras unu spesmilon.

Kiam tiu telegramo alvenos en X. ?

Post tri aŭ kvar horoj.

Pakajoj ne estas alprenataj tie ĉi ; vi devas iri al la fenestreto, tie.

(*El Frazlibro de la ĉiutaga vivo*, J. Borel-Berlin-1907).